

„Elkreskis rozbranĉeto...“ (El la vilaĝo Pöhlde ĉe Herzberg)

Iam la fama germana imperiestro Heinrich (Henriko) loĝis certtempe sur la monto „Birdejo“ (Vogelherd) ĉe la vilaĝo Pöhlde.

Li vizitis la monaĥejan tombejon en Pöhlde. Kune kun li la monaĥoj kaj multaj piaj setlistoj el la regiono montareto Ruĝmonto (Rotenberg), ekz. el Rhumspringe, akompanis lin al la preĝejo, por festi la kristnaskan meson.

Pastro Laŭrentius gardis la pordegon. Atendinte li paŝis senpaŭze apud la tombejo. Lia vizaĝo elradiis kontentan pacon. Ŝajnis, ke la stelo de Betlehemo atingis lin. Li paŝis en la neĝo. Subite la lumo el lia kornlanterno radiis al seka rozarbusto. Kaj vidu – sur la branĉeto floris rozeto. Per siaj fingroj li fajne ŝiris la florantan rozeton. Subite en lia koro ekestis la ideo krei kristnaskan kanton kaj li formis el ĝi la konatajn versojn.

Dum la kristnaska periodo en germanlingvaj regionoj ĝis nun oni nepre kantas la faman kortuŝan kanton „Elkreskis rozbranĉeto...“ pri la mirakla rozeto, respektive floreto.



La aŭtentikan tradukon al Esperanto faris Joachim Gießner el Herzberg.

**Elkreskis rozbranĉeto...
(Es ist ein Ros entsprungen)**

*Elkreskis rozbranĉeto el rozarbust' de Di'.
Aŭguro de profeto rakontis jam pri ĝi.
Naskiĝis rozfloreto' meze en vintra nokto
laŭ diro de l'profet'.*

*Ja naskis tiun rozon, Jesaj' prognozis ĝin,
el sia korpo sproson Mari' la Virgulin'.
Laŭ dipotenca vol' ŝi naskis Di-infanon
por tuta mond' konsol'.*

*Kaj tiu belfloreto tre hele lumas ĝi.
Obskuron la brileto forprenas nun de ni.
Vi hom' kaj vera Di'el pekoj kaj suferoj
estas savant' por ni.*



Joachim Gießner (1913-2003)



La konatan kantmelodion kreis Michael Praetorius (1571–1621) en Wolfenbüttel.

Es ist ein Ros entsprungen

*(Weihnachtslieder 1600-1700
Volkslied im 17. Jahrhundert)*

*Es ist ein Ros entsprungen
Aus einer Wurzel zart.
Wie uns die Alten sungen,
Aus Jesse kam die Art
Und hat ein Blümlein bracht,
Mitten im kalten Winter,
Wohl zu der halben Nacht.*

*Das Röslein das ich meine,
Davon Jesaias sagt:
Maria ist's, die Reine,
Die uns das Blümlein bracht.
Aus Gottes ew'gen Rat
Hat sie ein Kind geboren
Wohl zu der halben Nacht.*

*Das Bümelein so kleine,
Das duftet uns so süß,
Mit seinem hellen Scheine
Vertreibt's die Finsternis.
Wahr' Mensch und wahrer Gott,
Hilf uns aus allem Leide,
Rettet von Sünd' und Tod.*

*O Jesu, bis zum Scheiden
Aus diesem Jammertal
Laß Dein Hilf uns geleiten
Hin in den Freudensaal,
In Deines Vaters Reich,
Da wir Dich ewig loben.*

Elkreskis rozbranĉeto (Es ist en Ros entsprungen)

St Germanus (634-734) (trad. Joachim Gießner) Germana 14-a jc (harm. M. Praetorius (1571-1621))



Soprano
Alto
Tenoro
Baso

1. El - kres-kis roz-bran - ĉe - to el roz - ar-bust' de Di'. Aŭ -
2. Ja nas-kis ti - u ro - zo, Je - saj' prog-no-zis ĝin, el
3. Kaj ti - u bel-flo - re - to tre he - le lu-mas ĝi. Ob -

5
gu - ro de pro - fe - to ra - kon - tis jam pri ĝi. Nas - ki - ĝis roz-flo -
si - a kor-po spro-son Ma - ri' la vir-gu - lin'. Laŭ di - po-ten-ca
sku-ron la bri - le - to for - pre - nas nun de ni. Vi hom' kaj ve-ra

10
ret' me - ze en vin-tra nok - to laŭ di-ro de pro - fet'.
vol' ŝi nas-kis Di - in - fa - non por tu-ta mond' kon - sol'.
Di' el pe - koj kaj su - fe - roj es - tas sa - vant' por ni.